

Letero de nia Prezidanto

Karaj Klubanoj:

Tristaj estas ni LEKanoj. La forpason de nia Honora Prezidanto, D-ino Marjorie Boulton, ni sentas profundege. Ŝi estis vere kreema literaturisto, kiu produktis amason da inspiraj volumoj poezie kaj proze. Ne nur tio. Sindone kaj bonkore ŝi mem kuraĝigis generaciojn da personoj. Neniu dubas ŝian grandegan influon tre diversnivelan, tra la Movado. La vortoj de tiu eminentulo restos trezoro, pro sia spriteco kaj saĝeco. Eĥu ili senlime kaj senfine.

David Thornell



Marjorie Boulton 7 majo 1924 – 30 aŭgusto 2017

Per la forpaso de Marjorie Boulton, la Esperanto-literaturo perdis unu el siaj plej elstaraj figuroj kaj la Esperanto-movado unu el siaj plej sindonaj aktivuloj. Ŝi naskiĝis en 1924 en Teddington, sed kreskis ĉefe en norda Anglio. En Kolegio Somerville, Oksfordo, la modesta knabino ne nur elstaris kiel studento sed ankaŭ verkadis talentan anglalingvan poezion, kiu estis kolektita nur du jarojn post ŝia diplomiĝo en propra libro, *Preliminaries*. Ŝia eltrovo de Esperanto en tiu sama jaro (1949), kiun ŝi lernis kaj mastris rapide, liberigis ŝian poezion sentemon, longe limigitan de la pezo de la anglalingva literatura tradicio.

Ŝi enamiĝis al Esperanto. Tri jarojn post eklerno, ŝi jam verkis poezion en la lingvo. Post nur ses jaroj ŝi produktis propran volumon, *Kontralte* (1955), kuraĝe aperigotan de Juan Régulo Pérez ĉe la eldonejo Stafeto. Temis pri impona kolekto – tricent paĝoj da fajne fasonitaj, zorge strukturitaj versaĵoj. William Auld, antaŭparole, notis la sinceron, honestecon, de ŝia unika voĉo. Auld skribis en la enkonduko, ke kiam li unue vidis unu el ŝiaj aparte brilaj poemoj, “Marborda ŝtono”, li sendis al ŝi admiran leteron, en kiu li petis vidi ŝiajn jamajn verkojn en Esperanto. Ŝi modeste respondis, ke tio ne eblas, ĉar temas pri la *unua* ŝia Esperanta poemo.

La poezio lavangis el ŝia plumo. Ŝi komencis poŝtkartan korespondadon kun Auld en 1953 en la formo de rondeloj. Tiuj ĉarmaj kaj ŝajne senpenaj interŝanĝoj poste aperis kiel *Rimleteroj* (1976). En 1957 sekvis *Cent ĝojkantoj*. Kaj en 1959 venis plia impona volumo – 360 paĝoj da pliaj elstaraj poemoj – la kolekto *Eroj*.

En 1956 ŝi unuafoje renkontis Julion Baghy, kiu, kvankam personece tute kontrasta al ŝi, plej bone modelis tion, kion ŝi volis atingi kiel Esperanto-verkisto. Aliaj verkoj de ŝi estis *Virino ĉe la landlimo* (teatraĵo 1959), biografoj de Zamenhof (anglalingva 1960, Esperantlingva 1962), *Okuloj* (kolekto de diversaj verkformoj 1967), *Poeto fajrokora* (studo pri Baghy 1983), *Faktoj kaj fantazioj* (facilaj legaĵoj 1984).

Tra ĉiuj tiuj jaroj, ŝi laboris por Esperanto, ekzemple kiel gvidanto de someraj lernejoj en Barlastono, kiel ano de la Akademio de Esperanto, sekretario de la Internacia Somera Universitato (nun la Internacia Kongresa Universitato) kaj kiel bonveniganto de esperantistaj studentoj en Oksfordo. Cetere ŝi estis Honora Prezidanto de la Londona Esperanto-Klubo, kaj ofta prezentanto ĝis relative granda aĝo.

Ekster Esperanto, Marjorie instruis anglan literaturon en kolegio por trejni instruistinojn kaj fariĝis estro de la Kolegio Charllotte Mason en Ambleside, Cumbria, inter 1962 kaj 1970. Ŝi poste reeriris al Oksfordo kaj ricevis la doktoriĝan diplomon en 1976.

(mallongigita kaj adaptita de artikolo de Humphrey Tonkin en la UEA-revuo “Esperanto”, oktobro 2017)

Anglalingvaj nekrologoj de Marjorie haveblas ĉe www.theguardian.com kaj www.telegraph.co.uk

Loko, horaro kaj aliaj informoj

Ni kunvenas vendredvespere, en iu el du lokoj:
Diorama Arts Studios, 201 Drummond Street,
NW1 3FE (por kunveno kun programo);
Hotel Ibis, **5 Commercial St, London E1 6BF** (por
babilvespero)

Kutima programo ĉe Dioramo:

18:00 lingvokurso(j) kaj/aŭ Konsilantara kunsido

19:15 - 20:15 prelego aŭ alia ĉefprogramero

20:15 - 20:45 paŭzo

20:45 - 22:00 forumo, diskuto aŭ daŭrigo de la
ĉefprogramero

22:00 fino



Por Diorama (nur):

Stacioj:

Metroo: Euston, Warren St (linioj Victoria,
Northern); Euston Square, Great Portland St.
(linioj Circle, Metropolitan, Hammersmith & City);
Regents Park (linio Bakerloo)

Fervojo London Overground: Euston

Busoj: 10, 14, 18, 24, 27, 29, 30, 73, 88, 134, 205,
390; krome: 453, C2 (Dioramo); ~~59, 68, 91, 168,~~
~~253, 476~~ (Ibis).

Kotizoj: £10 jare; fora membro: £6 jare.

Kluba retejo:

<http://www.esperanto.org.uk/lek/lek.htm>

Lokaj grupoj: Kingston: Roy Cliffe 020-8397 5895;
Orientlondono: Roy Simmons 01473-461346
rokeby@globalnet.co.uk; Sudlondono: Gregory Porilo
020-8672 8095 esperanto-sleg@tiscali.co.uk.

Federacioj: Orienta: Roy Simmons (vidu supre);
Sudorienta: Kevin Murray, 11 Leybourne Ave, West
Byfleet, Surrey KT14 7HB 01932-345779
yarrump@gmail.com.

Funkciuloj: Honora Vicprezidanto: Heleno Fantom;

Konsilantaro: David Thornell (Prezidanto kaj Sekretario), Matt Peperell (Vicprezidanto), John Wells (Vicprezidanto), Arturo Prent (Kasisto), Anica Page (Registristo), Renato Corsetti, Roland England, Stan Keable, Chris Lewis, Anna Lowenstein, Terry Page, Antony Rawlinson (Bultenisto).

Adresoj: David Thornell: lek.sekretario@gmail.com; Arturo Prent: 7 Walton Garden, Hutton, Brentwood CM13 1EJ
ap_esp-lek21@yahoo.co.uk, Terry kaj Anica Page: 7 Hampton, Gt Holm, Milton Keynes MK8 9EP terry_page@btinternet.com,
anica_page@btinternet.com, Antony Rawlinson: 5 Thorpe Crescent E17 5BY acj.rawlinson@ntlworld.com.

Kluba Programo:

novembro:

- 3 Diskut-vespero – *La Hejmkrizo* (Ibis)
- 10 Memorvespero por Marjorie Boulton (Dioramo – kun
la provizo de trinkaĵoj kaj frandaĵoj)
(1800h: konsilantaro)
- 17 Literatura Vespero (Ibis)
- 24 John Wells – *Lingva Seminario* (Dioramo)

decembro:

- 1 Diskut-vespero – kunportu kaj preparolu viajn
Esperantaĵojn **Ibis-Shoreditch (metroo: Aldgate East)**
- 8 Chris Lewis – *Aspektoj de Asekuro* (Dioramo)
- 15 Zamenhofa Vespero (Dioramo)
(1800h: konsilantaro)
- 22, 29, 5 jan Neniu kunveno

januaro 2018:

- 12 *Novjara Festo* (Dioramo)

Esperanta Kalendaro:

27 dec – 3 jan 2018: 16a Novjara Renkontiĝo – Saarbrücken,
Germanio. www.esperantoland.org/nr, lu.esperanto@gmx.de
13-17 aprilo 2018: Brita Kongreso – Morlan Centre,
Aberystwyth, Kimrio. <http://britakongreso.org>
28 jul – 4 aŭg 2018: 103a Universala Kongreso de Esperanto –
Lisbono, Portugalio, <http://uea.org/kongresoj>
Vidu www.eventoj.hu/kalendaro.htm por ampleksa listo de
renkontiĝoj.

Aliaj anoncoj:

Sukcesis ĉe la ekzamenoj laŭ la Komuna Eŭropa
Referenckadro, KER, okazintaj en Londono en pasinta junio,
niaj membroj Daniel Hayon kaj Christopher Lewis. Sukcesis
krome Wieslaw Klak de la klubo de Southampton, iel ligita al la
londonaj instruantoj, kaj ankoraŭ Tim Owen de EAB, Paul
Roberts, Gabriel Beecham kaj Paul Henry Barron.
(Renato Corsetti)

*Bv. sendi informon al la bultenisto antaŭ 12a decembro por
mencio en la sekva Kluba Bulteno.*